Superrigardo pri KODEJO

Jaro 2009

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Irmina Szustak
Estrarano de TEJO pri Landa Agado

02/09/2010

Enhavo

1 Enkonduko....2
2 Respondoj....2
3 Membraro....3
4 Estrarperiodo....4
5 Informiloj....5
6 Strukturo kaj rilatoj kun tegmenta organizo....7
7 Interna komuniko....8
8 Financoj....8
9 Renkontiĝoj....9
10 Spertitaj problemoj....11
11 Eksteraj rilatoj....11
12 Konkludoj....11

1 Enkonduko

Jam estas la duan jaron aperas la demandaro KODEJO (Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj), kies celo estas doni pli klaran bildon pri la stato de la landaj sekcioj de TEJO, kaj havi aktualajn datenojn pri ili. Ĉi-jare 25 el la 45 landaj sekcioj de TEJO respondis al la demandaro, kompare al 19 lastjare.

La enketo estis malferma al respondeculoj de la landaj sekcioj en decembro kaj januaro, tiel ke la informoj estas ankaŭ uzeblaj por ĝisdatigi la informojn de la Jarlibro, ŝparante unu informkanalon. La enketo estis respondebla ĉefe tra la reto dank' al formularo, kiu aŭtomate plenigis guglan kalkultabelon.[1]

Ĉi-foje oni enkondukos en tiu superrigardo komparon inter 2008 kaj 2009, permesante diveni dumtempajn evoluojn. La leganto estas invitata ankaŭ tralegi la *superrigardon pri KODEJO 2008*.

Oni devas singardi de tro evidentaj kaj facilaj konkludoj trarigardante la rezultojn, unue ĉar ne estas multe da respondoj (25 kompare al la 45 landaj sekcioj de TEJO), kaj ĉefe ĉar granda proporcio de la demandoj estas subjektivaj aŭ postulas precizajn konojn kiujn la respondintoj ne necese plene regas je momento de plenigo de la formularo.

2 Respondoj

La jenaj asocioj respondis al la enketo:

Argentina Esperantista Junulara Organizo (ArgentEJO), Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO), Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ), Dana Esperanta Junulara Organizo (DEJO), Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO), Flandra Esperantista Junulara Asocio (FLEJA), Germana Esperanto-Junularo (GEJ), Hispana Esperanto-Junulara Societo (HEJS), Itala Esperantista Junularo (IEJ), Irana Esperantista Junulara Organizo (IREJO), Junularo Esperantista Brita (JEB), Junulara Esperantista Burunda Organizo (JEBUO), Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO), Junulara Esperanto-Ligo Israela (JELI), Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ), Korea Esperanto-Junularo

1 Ĝi estis ankaŭ sendita poŝte al kelkaj landaj sekcioj kies aliro al reto estas problema.

(KEJ), Kroatia Esperanto-Junulara Asocio (KEJA), Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ), Norvega Junularo Esperantista (NJE), Pola Esperanto-Junularo (PEJ), Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ), Ukraina Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ), Usona Esperantista Junularo (USEJ), Vjetnama Esperanta Junulara Organizo (VEJO).[2]

Ĉi-foje la Japana Esperantista Junularo (JEJ) kaj la Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj (JOTE) ne plenigis la enketon. Aliflanke, ArgentEJO, DEJO, HEJS, KEJ (Katalunio), SEJU, ULEJ, USEJ, kaj VEJO partoprenas por la unua fojo.

Por 11 el la 17 asocioj kies nomo aperas jam por la 2a fojo, respondecis la sama homo. Tiu informo estas sufiĉe grava, ĉar donas ideon pri la kvalito de la komparo inter jaroj, ĉefe por subjektivaj demandoj.

Diagramo 1: Stato de via organizo



La diagramo 1 unavide montras malkreskon de la aktivaj asocioj kompare al la tuto (52% kontraŭ 58% en 2008) sed la kialo estas ke el la novaj respondintoj, plejmulto estas "vekiĝantaj asocioj". Se oni rigardas detale, la stato de la asocioj ne ŝanĝiĝis multe inter 2008 kaj 2009. Nur rimarkindaj estas Britio kiu ŝanĝis de "vekiĝanta" al "aktiva", Finnlando de "dormanta" al "vekiĝanta", Kroatio de "vekiĝanta" al "dormanta", kaj Flandrio de "aktiva" al "dormanta".

Oni povas tutlogike supozi ke el la ne-respondintoj, plejmulto estas dormantaj landaj sekcioj (krom certe JOTE, HEJ kaj JEJ, kiuj havas funkciantan estraron kaj komitatano(j)n).

Kvankam la kresko de la nombro da respondoj estas bonvena, estas ankoraŭ malfacila diri ĉu KODEJO permesis atingi unu el siaj celoj, nome revigligi la landajn sekciojn tra pli bona informo pri la stato de la sekciaro.

3 Membraro

La pritakso de la membraro de la landaj sekcioj estas tre malfacila tasko, kaj bezonus apartan atenton, pro pluraj kialoj. Unue ĉar ĉiuj landaj sekcioj havas sian propran metodon por kalkuli tiujn membrojn, kiu ne aŭtomate samas tiu de la kotizpagantoj. Due, ĉar ĝi forte dependas de la grandeco

2 Por eviti konfuzojn, en tiu ĉi dokumento la mallongigoj de la Kataluna kaj de la Korea Esperanto-Junularoj estos respektive KatEJ kaj KorEJ. Tamen atentu ke tiuj mallongigoj ne estas oficialaj.

de la lando, kaj aliaj faktoroj, kiel la vigleco de la movado, kaj subteno de nejunulara organizo, inter aliaj. Oni ankaŭ povas supozi ke la ekzisto de renkontiĝoj dum kiu eblas akiri rabaton se oni membras ludas gravan rolon.

Diagramo 2 kaj 3: Membroj kaj kotizantaj membroj



El la evoluo de la membraro nenio vere rimarkindas, por plejmulto la deklarita nombro estas samskala. Nur rimarkindas la malkresko de la flandraj membroj, kies nombroj malkreskis de 41 al 22 (el kiuj nur duono kotizas). Tiu tendenco konfirmas la dormantan staton de FLEJA.

Rilate al varbado de novaj membroj, la tabelo 1 listigas la plej kutimaj kanaloj. Estas malfacile taksi ĉu ĝi estas kompleta, ĉar povas okazi ke la responditon ne havis enkape ĉiujn manierojn por reklami pri sia landa sekcio je momento de plenigo de la formularo (ĉar temas pri malferma demando). Tial povas esti surpriza la malgranda nombro da respondoj rilate al uzo de la reto. Kompreneble ĉi tie ne estis menciitaj la organizitaj renkontiĝoj, kiuj havas apartan sekcion (vidu sekcio 9).

Tabelo 1: Kiel vi varbas novajn membrojn

Tipo da varbado	Landaj sekcioj	Nombro
Foiroj/festivaloj	DEJO, FEJO, JEB, JEFO, KatEJ, PEJ	6
Lokaj agadoj (kursoj, ktp)	BEJO, GEJ, JEBUO, KorEJ, PEJ, NJE	6
Amaskomunikiloj	GEJ, KatEJ, NJE, SKEJ	4
Kurskunvenoj	DEJO, PEJ, NJE, VEJO	4
Per la reto (retpaĝo, Facebook, Lernu,...)	ĈEJ, DEJO, JEB, PEJ	4
Prelegoj/prezentoj en Lernejo	ĈEJ, KatEJ, PEJ, SKEJ	4
Reta kurso	ĈEJ, IEJ, JEFO, GEJ	4
Eldonoj	JEB, SKEJ	2
Ekskursoj	VEJO	1
Financo de vojaĝo	KorEJ	1

Noto: Ne respondis FLEJA, JELI, USEJ

4 Estrarperiodo

Rilate al estrarperiodo, la plej ofta kazo estas 1 aŭ 2 jaroj, kiu estas la respondo de po 11 landaj sekcioj. Notindas ke kontraŭe al lasta jaro, KorEJ ĉi-foje deklaris 2-jaran oficperiodon, kompare al 1 en 2008.

Kiel estis jam rimarkita en la enketo de 2008, ne estas pinta preferata monato por elekto de nova estraro. Eĉ pli rimarkindas ke la elektita monato povas ŝanĝi. El la 17 landaj sekcioj kiuj respondis jam por la dua fojo, 9 donas malsaman elektomonaton por la enketoj de 2008 kaj 2009, eĉ monatoj kiuj ne apartenas al la sama sezono. Tamen aprilo, majo kaj decembro estas preferataj.

Tabelo 2: Estrarperiodoj

Estrarperiodo	Landaj sekcioj	Nombro
1 jaro	ĈEJ, DEJO, FEJO, FLEJA, IEJ, JEB, JEFO, JELI, KEJA, NEJ, USEJ	11
2 jaroj	ArgentEJO, BEJO, GEJ, HEJS, IREJO, KorEJ, NJE, PEJ, SEJU, SKEJ, VEJO	11
3 jaroj	JEBUO	1
Pli	KatEJ	1

Noto: Ne respondis ULEJ.

5 Informiloj

Rilate al informiloj aparte okulfrapas la malfacileco pluaperigi paperajn revuojn. Dum 9 menciis aperon de oficiala propra organo en 2008, nur 3 restas, kaj ties revuoj (*Momenton!* por BEJO, *Kune* por GEJ kaj AEJ, *Bulteno* por FEJO) ankaŭ spertas malfacilaĵojn, kaj malregulan aperritmon. Plej ofte la malaperitaj revuoj estas anstataŭigitaj de rubriko en nejunulara revuo kaj dissendlisto, alia menciinda maniero estas la retpoŝta dissendo.

Tabelo 3: Ĉu via organizo havas oficialan organon aŭ informilon?[3]

Respondoj	Landaj sekcioj	Nombro
Rubriko en ne-junulara revuo	IEJ, IREJO, JEFO, JELI, KatEJ, KorEJ, NJE, PEJ, SEJU, SKEJ, ULEJ	11
Dissendlisto	BEJO, ĈEJ, GEJ, IEJ, JEBUO, JEFO, NJE, SEJU, SKEJ	9
Retpoŝta dissendo	ĈEJ, DEJO, FLEJA, GEJ, IEJ, JEFO, NJE, USEJ	8
Papera eldono	BEJO, GEJ, FEJO	3
RSS	GEJ, IEJ, PEJ	3
Forumo	JEB	1
Retpaĝaro	HEJS	1
Twitter	GEJ	1
Ne havas	KEJA, NEJ	2

Noto: ne respondis: ArgentEJO, VEJO

3 Kompreneble multe pli da landaj sekcioj havas retpaĝaron (vidu ĉi-sube), sed ne necese uzas ĝin kiel oficiala organo, tial malmute da landaj sekcioj aperas en tiu ĉi tabelo.

Diagramo 4: Aperreguleco de la informoj



Noto: ne respondis: JEB, JEBUO, KEJA, NEJ, ULEJ, VEJO

Rilate al aperreguleco de la informoj ne estas ĉefa tendenco, kvankam rimarkindas en la grafiko 5 ke laŭdinde 6 el la responditoj sukcesas oferti freŝajn informojn pli ol 4-foje po jaro.

Por la retpaĝoj de la landaj sekcioj, plej ofte troviĝas kaj konstantaj informoj, kaj novaĵoj rilate al la landa sekcio aŭ al la movado, kies refreŝiĝo okazas plej ofte unufoje monate.

Diagramo 5 kaj 6: Enhavo de la retpaĝo, kaj kiom ofte ĝi refreŝiĝas:

Enhavo de la retpaĝo



Kiom ofte ĝi refreŝiĝas



Noto: 5 landaj sekcioj ne respondis: ArgentEJO, IREJO, JEBUO, ULEJ kaj VEJO

JEFO, KEJA kaj FLEJA havas retpaĝaron nur kun aktualaĵoj, aliflanke FEJO, HEJS, JELI, NEJ, NJE kaj USEJ prezentas nur stabilan enhavon. La retpaĝarojn de BEJO, ĈEJ, DEJO, GEJ, IEJ, JEB, KatEJ, KorEJ, PEJ, SEJU kaj SKEJ havas ambaŭ.

6 Strukturo kaj rilatoj kun tegmenta organizo

La plejmulto de la asocioj estas junulara sekcio de nejunulara organizo (18 el 25).

Diagramo 7: Strukturo de la asocio



Noto: JSNO: Junulara Sekcio de Nejunulara Organizo
SORK: Sendependa Organizo kun Rilata Kontrakto
SOKJP: Sendependa Organizo kun Jura Personeco

Diagramo 8: Rilatoj kun nejunulara organizo



Estus interesa kompari la strukturon de la asocio kun ĝia stato. Eĉ se proporcie oni konstatas pli da aktivaj organizoj por la sekcioj de nejunularaj organizoj. Estas vere tro malmulte da respondoj por statistike konfirmi tian tendencon.

La rilatoj kun nejunularaj organizoj meznombre sufiĉe bonas (la meznombro estas 3,72 laŭ pritakso de 1, "malbonegas", ĝis 5, "bonegas"). Oni tamen povas konstati malpliboniĝon de tiaj rilatoj (kies valoro estis meznombre 4 en 2008). 3 asocioj malaltigis sian pritakson de la rilatoj de "bonas" al "mezas".

La plej oftaj kritikoj koncerne la rilatoj kun nejunularaj organizoj estas manko da komunikado (por ArgentEJO, BEJO, DEJO, IREJO, KEJA, ULEJ, kaj USEJ). Sekvas la kontraŭstaraj aŭ konfliktaj rilatoj (IEJ, SEJU), kaj manko da komunaj interesoj (FEJO).

7 Interna komuniko

Diagramo 9 kaj 10: Ofteco de la retaj kaj fizikaj kunvenoj

Retaj



Fizikaj



Proporcie okaze de tiu ĉi demandaro estas malpli da landaj sekcioj kiuj uzas la reton por siaj kunvenoj (80% en 2009, kompare al 85% en 2008). La plejmulto retkunvenas malregule, kiel montras la diagramo 9. Rilate al reguleco de la fizikaj kunvenoj, ĝi ne unuavice vere rilatas al grandeco de la lando, sed pli al kutimoj. La plej aktivaj landaj sekcioj emas renkontiĝi pli ofte, kiam unufoja kunveno pli oftas ĉe vekiĝantaj asocioj.

20 el la landaj sekcioj havas retan diskutliston por membroj (ArgentEJO, BEJO, ĈEJ, DEJO, FEJO, FLEJA, GEJ, IREJO, JEB, JEBUO, JEFO, JELI, KatEJ, NEJ, NJE, PEJ, SEJU, SKEJ, ULEJ, USEJ), kaj 14 havas retan diskuliston por la estraro (ĈEJ, DEJO, FLEJA, GEJ, IEJ, JEB, JEBUO, JEFO, KatEJ, NEJ, NJE, PEJ, SEJU, ULEJ).

8 Financoj

Tabelo 4: financa stato de la landaj sekcioj

Financa stato	Asocioj	Nombro
Riĉa organizo	-	0
Stabila financa situacio:	ĈEJ, DEJO, FEJO, FLEJA, GEJ, IEJ, JEB, JEFO, KorEJ, NEJ, NJE, PEJ, SEJU	13
Havas sufiĉe nur por baza funkciado:	BEJO, KEJA, SKEJ, VEJO	4
Apenaŭ pluvivas finance:	ArgentEJO, KatEJ, ULEJ	3
Ne havas financojn:	HEJS, IREJO, JEBUO, JELI, USEJ	5

Rilate al financoj, la demandaro ne postulis ciferojn sed subjektivan pritakson de la stato de sia propra asocio, kiu en si mem povas esti malfacila, kaj maloportune komparebla inter landoj. Neniu deklaris sin riĉa, kvankam plejmulto (13) konsideras sian staton stabila. 5 asocioj eĉ ne havas financon.

9 Renkontiĝoj

Tabelo 5: Organizitaj renkontiĝoj de la landaj sekcioj

Tipo de aranĝoj	Asocioj	Nombro
aranĝoj/renkontiĝoj (<4 tagoj)	ĈEJ, DEJO, FEJO, FLEJA, GEJ, HEJS, IEJ, IREJO, JEB, JEBUO, JELI, KatEJ, KorEJ, NEJ, NJE, PEJ, SEJU, SKEJ, ULEJ, USEJ	20
aranĝoj/renkontiĝoj (>4 tagoj)	BEJO, ĈEJ, GEJ, IEJ, JEFO, PEJ, SKEJ, ULEJ, VEJO	9
seminarioj/trejnadoj/kursoj	ĈEJ, DEJO, FEJO, GEJ, JEFO, KatEJ, KorEJ, SKEJ, ULEJ	9
neesperantaj eventoj	ĈEJ, FLEJA, KatEJ, SKEJ, ULEJ	5
(Lingvaj/kulturaj) festivaloj	ĈEJ, KatEJ, SKEJ, ULEJ	4
Aliaj	NJE (picvesperoj, ludvesperoj), PEJ (Zamenhof-festo), SEJU (ĉiumonataj vesperoj)	3

Noto: Ne respondis: ArgentEJO, KEJA

Tabelo 6: Partoprenitaj renkontiĝoj

Tipo de aranĝoj	Asocioj	Nombro
Aranĝoj/renkontiĝoj (<4 tagoj)	BEJO, ĈEJ, GEJ, IEJ, IREJO, JEB, KatEJ, PEJ, SKEJ, USEJ, VEJO	11
Aranĝoj/renkontiĝoj (>4 tagoj)	BEJO, ĈEJ, GEJ, JEFO, KEJA, PEJ, SKEJ	7
Seminarioj/trejnadoj/kursoj	ArgentEJO, BEJO, ĈEJ, GEJ, JEB, KatEJ, SKEJ	7
(Lingvaj/Kulturaj) festivaloj	ArgentEJO, DEJO, FEJO, GEJ, JEB, KatEJ, PEJ, SKEJ, SEJU	9
Neesperantaj eventoj	ĈEJ, DEJO, IEJ, JEBUO, KatEJ, NEJ, PEJ, SKEJ	8
Aliaj	DEJO (Roskilde Festivalo), SEJU (Prelegadoj por lernejoj)	2

Noto: Ne respondis: FLEJA, HEJS, JELI, KorEJ, NJE, ULEJ

La tabelo 5 klare montras la gravan oftecon de la okazigo de mallongaj renkontiĝoj, kiu povas esti organizita flanke de pli grava(j) aranĝo(j), seminarioj(j) aŭ kurso(j) dum la jaro. Tutlogike rimarkebla estas ke ĉefe en la plej fortaj asocioj, kie troviĝas plej multe da membroj, estas organizitaj pli-ol-4 tagaj aranĝoj.

Membroj de landaj sekcioj ankaŭ partoprenas aranĝojn organizitaj de aliaj asocioj, kiel prezentitaj en la tabelo 6. Plej ofte temas pri malpli-ol-4-tagaj aranĝoj, sed ankaŭ (Lingvaj/Kulturaj) festivaloj kaj aliaj ne-esperantaj eventoj, cele de informado.

Tabelo 7: renkontiĝoj

Sekcio	Organizitaj aranĝoj	Aliaj Esperantaj partoprenitaj aranĝoj	Ne-esperantaj partoprenitaj aranĝoj
BEJO	Ekde 2010: NOVA (januaro)	Nejunulara evento	
ĈEJ	Enlandaj seminario; IJK 2009 + semajnfinoj, trejnadoj kaj kursoj	Aranĝoj de ĈEA	
DEJO	Teatraĵo, seminario en gimnazioj. Instruado por la junularo en Kopenhago.	KEF 2009 en Helsingor	Roskilde Festivalo; Eŭropa sociala forumo en Malmø 2008 kaj COP15 en Kopenhago 2009
FEJO	Aktivecoj de EsperHe; FEJO-tendaro kaj Solstica Festo, semajnfinoj		Maailma kylässä (Monda Vilaĝo) en Helsinko
FLEJA	PSKK; manĝvespere 1-foje monate; planita sporta agado		
GEJ	IS ĝis 2008, JES kun PEJ, IJK 2009 kune kun ĈEJ kaj PEJ; KEKSO du-foje jare	Germana Esperanto Kongreso (Herzberg), FESTO 2009	
HEJS	semajnfina renkontiĝo		
IEJ	IJF (ne okazis en 2009 pro tertremo), SKI, Esperanto tago	Itala Kongreso de Esperanto	Budo en komiksa foiro LuccaComics
JEB	Sezonaj renkontiĝoj	Semajnfinaj aranĝoj	
JEBUO		Zamenhofa tago, junulara renkontiĝo dum nejunulara kongreso	Internacia junulara Festivalo (Bujumbura)
JEFO	FESTO	JES, karavanoj	
JELI	Tutlanda junularkunveno, ekskursoj, hejmaj renkontiĝoj		
KatEJ	Printempa Renkontiĝo, Kataluna Renkontiĝo, Iberia Renkontiĝo		
KorEJ	KS 2010, Somera E-Kurskunveno		
KEJA	MIRO 2009		
NEJ	Esperanto-kafejo		Festivalo en Amsterdamo
NJE	Kabana semajnfino, kursoj, lud- kaj pic-vesperoj	landa nejunulara kongreso	
PEJ	AS ĝis 2008, IJK 2009 kun ĈEJ kaj GEJ, JES en Zakopane, PEJ kunveno, Zamenhof festo	Arkones, organizado de UK 2009	scienca pikniko, scienca festivalo (kun Historia Muzeo de Polaj Judoj)
SEJU	Oranĝa Renkontiĝo, Anemona Renkontiĝo, Nerdia Renkontiĝo		Lerneja foiro

Tabelo 7: renkontiĝoj

Sekcio	Organizitaj aranĝoj	Aliaj Esperantaj partoprenitaj aranĝoj	Ne-esperantaj partoprenitaj aranĝoj
SKEJ	Tutslovakia renkontiĝo, AS en 2008, Zamenhofa vespero	SES (ĉeforganizas E@I)	Bibliotéka: librofoirego en Slovakio, kun Espero
USEJ	Planita revivigi tendumadon	Landa kongreso de E-USA	
VEJO	63e IJK, KS 2010, UK 2012	KS en Nankin (Ĉinio)	

Noto: Ne respondis: IREJO kaj ULEJ

10 Spertitaj problemoj

Koncerne la spertitaj problemoj, la landaj sekcioj ofte suferas pro manko da aktivuloj/spertuloj, manko da partoprenantoj dum aranĝoj aŭ manko da membroj (ĈEJ, FEJO, FLEJA, IEJ, KorEJ, NEJ, PEJ, SKEJ, USEJ). La emo/intereso organizi estas alia bremso (FLEJA, HEJS, JELI, SKEJ), aŭ la manko de disponeblaj spertuloj (PEJ). Por kelkaj, la tro grandaj distancoj ene de la lando ludas rolon (en Svedio kaj Usono). Aliaj menciitaj malbonaj spertaĵoj rilatas al financaj problemoj (JEBUO), ne-komprenemo de ne-esperantistoj (ArgentEJO, DEJO), malfacila interkompreniĝo kun la nejunulara organizo (DEJO) aŭ malfacila komunikado inter aktivuloj (GEJ). Ofte menciitaj estas ankaŭ la praktikaj organizaj malfacilaĵoj.

11 Eksteraj rilatoj

11 el la respondintoj deklaras havi rilatojn kun ne-esperantaj organizaĵoj. Estas ĝenerale aŭ ŝtatinstancoj aŭ lokaj instancoj (kiel la Deutscher Bundesjugendring por GEJ aŭ la ministerio pri eksterlandaj aferoj por IEJ), kulturaj organizaĵoj (Historia Muzeo de Polaj Judoj kaj artcentroj por PEJ), junularaj movadoj (kiel la Junaj Verduloj en Slovakio), amaskomunikiloj, kaj organizantoj de festivalo (kiel Roskilde en Danio) kaj ĉi tiu listo malkompletas.

12 Konkludoj

Konklude al tiu superrigardo, estas pozitive bonvena ke pli da landaj sekcioj respondis al tiu ĉi demandaro, tamen malfacilas diri ĉu ĝi signifas ke ĝenerale la sekciaro pli bone fartas. La membraro de la landaj sekcioj kaj la okazigo de aranĝoj konstantas, sed la aperigo de la organoj spertis drastajn ŝanĝojn lastjare.

Espereble tiu ĉi superrigardo donos la ĝustan signalon pri la farto de via propra landa sekcio, kaj donos al vi la necesajn ilojn por plibonigi ĝiajn agadojn. TEJO daŭre pluaperigos tian demandaron, kiu certe pluevoluos laŭ la ricevintajn komentojn, kadre de ĝia strebo plivigligi komunikon inter ĝiaj landaj sekcioj.